



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responso eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.orgEsperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.orgP.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.orgK. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe**www.senlime.org**Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).**ENHAVO :****p. 1 : (grava) PEK-o de A.P.E. en Mozet !****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2010-2011 (2/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Kiel krei surtekstaron por filmo ?****p. 6 : Verviersa angulo : crise et espéranto****«Virtuala Trilanda Renkontiĝo»
...en Mozet (BE-Namur) !****Pro la unua PEKo de A.P.E. en Mozet-a kastelo (20-22an de majo), la prelego de J-M. Jacques en Select pri grupa vojaĝo al Napolo (Pompei kaj Herculanium) estas prokrastita al decidota dato. Intertempe, retrovu lin en Mozet !**

A.P.E. (Belg-valona Asocio Por Esperanto) planas ampleksan programon, kun du koncertoj (jOmO sabat-vespere kaj tradicia valona muziko vendredo-vespere), ekskursoj, speciala programo por infanoj kun duontaga ekskurso, esperanto-kursoj, prelegoj...

La koncerto de jOmO estos malfermita. Venu spekti lin ĝin eĉ se vi nepartoprenas al PEKo (Printempa Esperanto-Kunveno), invitu viajn familianojn kaj amikojn!

Pliaj informoj :

Doumont Valère - rue de Velaine, 114 bte 4 - 5060 SAMBREVILLE (BE)
Tel. +32 485 517 552



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncituraj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Ĉu la hebraika lingvo devenas de la Egipta ?

La plej grava el la alfabetoj kiujn ni konsideru nune estas la alfabeto **watan**. Tiu alfabeto, kiu estis la origina skribmaniero de la **Atlantoj** kaj de la ruĝa raso, kies tradicio estis transdonita al **Egiptio** kaj Hindio post la katastrofo en kiu malaperis Atlantido, estas la ĝusta traduko de la astra alfabeto.

Ĝi enhavas tri literojn sinsekvajn (interrespondaj kun la tri personoj de la Triunuo, aŭ al la tri unuaj «**Sephiroth**», kiuj estas la tri unuaj nombroj el kiuj eliris ĉiuj aliaj), sep planedajn kaj dek-du zodiakajn, do entute dudek-du karakterojn...

Tiu alfabeto, kun kiu **Moseo** konatiĝis en la Egiptaj temploj, iĝis la unua hebrea alfabeto, kiu tamen ŝanĝiĝis dum la jarcentoj, sen tute perdiĝi dum la mallibero de Babilono.

La origina alfabeto de la Atlantoj estis konservita en **Hindio**, kaj dank'al la **Brahmoj** ĝi atingis nin; kaj pri la atlanta lingvo mem, ĝi dividiĝis en plurajn dialektojn, kiuj eble mem devenis sendependaj lingvoj, kaj unu el tiuj lingvoj pasis en Egiption; tiu **egipta** lingvo estis la origino de la **hebrea** lingvo, laŭ **Fabre d'Olivet**.

Por pliaj precizigoj...

04-15 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "Ĉu la hebrea lingvo devenas de Egipta?", prelego de Ch. Norga.
Inf. norga@senlime.org

Kion ilustritaj poŝtkartoj povas sciigi al ni?

La bildkarto montranta Doktoron L.L.**Zamenhof** dum la Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer en la jaro 1905 enkondukas la prelegon kaj jenaj **demandoj**, al kiuj preleganto kaj aŭskultantaro respondos, konsistigos grandparte prelegan enhavon.

1. Kion diris kaj skribis la franca ĵurnalisto Remy de Gourmont en la jaro 1908 pri la esperantistoj?
2. Kio okazis dum la internacia ekspozicio de 1910 en Bruselo?
3. Kiuj domoj ludis rolon dum la 16a Belga Esperanto-Kongreso en Verviers en la jaro 1925?
4. Kial du serioj da ilustritaj poŝtkartoj de Neŭtrala Moresnet (Kelmis - La Calamine) portis esperantajn nomojn?
5. Ĉu tri aŭ kvar ŝtonoj simbolis la renkontpunkton de Prusio (Germanio), Nederlando, Belgio kaj Neŭtrala Moresnet inter la jaroj 1830 kaj 1918?
6. Kiu kreis por Neŭtrala Moresnet nepermesitajn poŝtmarkojn presitajn sur kelkaj malnovaj bildkartoj?

Tiu prelego estos okazo menciiti la unuan prezidanton de la Eo-klubo "**Amikejo**", Charles **Schriewer**, kiu korespondis kun sia familio per bildkarto kiam li servis sian patrujon en Ĉinio (Pekino: 1912-1914) kaj Afriko (Kigoma: 1914 - 1916).
Komentario pri tiuj tre interesaj ilustritaj poŝtkartoj finas la prelegon.

05-20 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "Kion ilustritaj poŝtkartoj povas sciigi al ni?" demandaro de Mathieu **Schrymecker**.

Kutima Karaokeado de Senlime

Se ni kelkfoje parolas pri la terapia valoro de esperanto, ni ne forgesu la konatan efikon de muziko por "dolĉigi la morojn", kaj la pedagogian valoron de la kantoj kiel lingvo-instruiloj.

Antaŭe, kantadi tamen ofte ne estis facile por multaj personoj. Pro tio, la emo kanti en niaj klubvesperoj iomete forvelkis... Karaokeo alportis novan teknikan rimedon por helpi nin: ofte troveblas sur la reto dosiero enhavanta la muzikon de kanto en formato mp3, aŭ eĉ pli bone midi (mid), kie ne enestas la paroloj - kiujn oni povas aldone skribi en teksto-dosieron kiun oni povos (iom post iom, laŭ la ritmo de la muziko) legi... kaj kanti dum aŭskultado de la muziko. Tamen, grupestro ne imagu al si ke karaokeo allogos multajn junulojn, krom se temus pri taŭgaj kantoj prezentitaj de "vigla" D.J. en kongrua ejo...!

Senlime ĉefe uzas la softvaron (legilon) "[Van Basco](#)" por ludi la karaokeon kaj la eldonilon "Karkan" por krei karaokeojn. Kompreneble, la tekstojn necesas unue traduki aŭ esperantigi. Prefere ni projekcias ilin sur grandan ekranon.

Jam aperis kaj elŝuteblas dekoj da kanzonoj adaptitaj de **Senlime**, interalie en la dosiero «fichiers» de la yahoo-grupo «Amikejo» (por elŝuti ilin, necesas aliĝi al tiu grupo!).

Bonan amuziĝon...

06-17 20h30 BE-Kelmis, Sélect: kutima **Karaoke-ado de Senlime**.
Inf. lousberg@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2010-2011 (2/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).

01-21 Vintra paŭzo : pro la kutime malbonaj veterkondiĉoj ni **NE** kunvenos.

02-18 19h30 BE-Kelmis, Sélect: Ĝ.A. de Verviersa Esperantista Grupo kaj de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org

03-18 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Kiom belas nia naturo**"(2), prelego de R. Demarche, kun lumbildoj.

04-15 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Ĉu la hebrea lingvo devenas de la egipta?**", prelego de Ch. Norga.
Inf. norga@senlime.org

05-20 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Kion ilustritaj poŝtkartoj povas sciigi al ni?**" demandaro de Mathieu Schrymecker.

06-17 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Karaoke de Senlime**.
Inf. lousberg@senlime.org



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **07-15, 08-19, 09-16, 10-21, 11-18** kaj **12-11** (Zamenhof-festo).

21-01 Pause hivernale : vu les mauvaises conditions météo. habituelles nous **NE** nous réunirons **PAS**.

18-02 19h30 BE-Kelmis, Sélect: A.G. du Groupe espérantiste de Verviers et de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org

18-03 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Comme est belle notre nature**" (2), conf. avec diapositives par R. Demarche.

15-04 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**La langue hébraïque vient-elle de l'égyptien?**", conférence de Ch. Norga.
Inf. norga@senlime.org

20-05 20h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Que peuvent nous apprendre les cartes postales illustrées?**" par Mathieu Schrymecker.

17-06 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Karaoke de Senlime**.
Inf. lousberg@senlime.org



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **15-07, 19-08, 16-09, 21-10, 18-11** et **11-12** (fête Zamenhof).

Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj **EMRo**.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

«Homoj kaj dioj»

Januare aperis novaj surtekstoj de **Senlime** : «*Des Hommes et des dieux*» (Xavier Beauvois - 2010)

Monaĥejo starigita en la Maghreb-a montaro (Tiberihine), dum la jaroj 1990... Ok kristanaj monaĥoj franc-devenaj harmonie vivas kun siaj islamanaĵoj fratoj.

Kiam teamo da fremdaj laboristoj estas buĉita de islama grupeto, teruro instaligas en la regiono. La armeo proponas sian protekton al la monaĥoj, sed tiuj-ĉi rifuzas. Ĉu ili devas foriri ? Malgraŭ la minacoj ĉirkaŭantaj ilin, la decido de la monaĥoj resti je kia ajn kosto, tagon post tago konkretiĝas. Ilia fina decido estos la frukto de spirita batalo kaj longa survojado.

Neniu restas senŝanĝa post la vidado de tiu filmo: la rolantoj kortuŝas nin kaj invitas nin al profunda pripensado... Transe de la evidenta spiriteca aspekto de la filmo, tiu-ĉi, sen trovi kontentigajn respondojn al la demandoj pri interpopola pliproksimiĝo - kiun tiom deziras esperantistoj - kuraĝigas nin al sincereco de la ideoj kaj digneco respondi pri ili... Videnda kaj (re)vidinda filmo!

La surtekstoj elŝuteblas el nia ttt-ejo ; la DVD aĉeteblas tra la komerco ek de nun.

Kiel uzi surtekstaron kun filmo

Respondon (espereble kontentigan) al tiu demando vi trovos sur la sekvanta paĝo 5. La filmon vi devas mem aĉeti kaj pritrakti.

«La Citronujoj»

Antaŭe ĵus aperis surtekstoj de **Senlime** : "*Lemon Tree*" (Eran Riklis - 2008)

La filmo, en kiu temas pri citronujoj minacitaj pro la konstruo de la fama muro sur la landlimo inter Israelo kaj Palestino, en etoso kiun vi povas imagi, pledas kontraŭ landlimoj, antaŭjuĝoj, burokratismo kaj nekomunikebleco,... Tuta programo kiun **Senlime** nepre volis subteni tra sia ttt-ejo.

Samtempe, **Senlime** kreis karaokeon "*Citronuj.kar*", laŭ iama kanto "*Lemon Tree*" de Peter, Paul and Mary, Trini Lopez,...), kanzono kiu, arabe interpretita, bonege sonor-dekoras la komencon de la filmo: "*Ci-tron-ujo tre bel-et-as kaj citron-a floro tre dolchas sed citrona frukt-o ho ve ja tut-e ne-niel mangh-eblas.*"

«La Edzino de Ĝilo»

Laste aperis alia surtekstaro de **Senlime**, por "*La Femme de Gilles*" (F. Fonteyne - 2004).

En tiu endoma filmo adaptita de samnoma romano (publikigita en 1937 de la belga Madeleine Bourdouxhe), la agado precipe disvolviĝas ĉirkaŭ la korpo kaj la vizaĝo de la personoj: Ĝilo (laboranta en altforno, en 1939) kaj Eliza (lia edzino, kiu prizorgas la infanojn kaj la domon, ofte helpe de sia fratino Viktorino...).

Enkondukas la filmon kanto de **Mistingeta** : "*Mon Homme*",

ekster la filmo ankaŭ iam kantita en esperanto, sub la titolo «*Mia Viro*», de Alberta **Casey** (sed laŭ iom fuŝita versio anglalingva "*My man*"). Kompreneble ankaŭ tiu-ĉi kanto estas karaokeigita de **Senlime**.

Nova turo apud trlanda ŝtono

La malnova «Wilhelminatoren» sur la nederlanda flanko de la Vaalserberg, la plej alta punkto de Nederlando (322,5 m super la mara nivelo), estas malkonstruota.

Anstataŭe, nova turo altas 31 m. Fakte 34 m, ek de kie la vizitanto povos lifti ĝis la malsupera parto, *sky walk*, ĉiela promenado kun panoramaj vidoj al Belgio, Germanio kaj Nederlando, la tuto 353,5 m super la marnivelo!

Vivanta dialekto

La «*Homereger Theater Group*» sukcese prezentis en Homburg (Plombimonto) komedion el Strasburgo tradukitan en la lokan dialekton, «Makt mech der wieht neet verrökt».

Entute ĉeestis 950 spektantoj por 4 vesperoj. Rimarkinda sukceso por dialekta teatro, kiun oni diras mortanta... Malprave, laŭ Ludoviko Hanen, kiu tiel eksperimentis jam de 1976 en Plombimonto antaŭ ol provi en Gemmenich kaj Montzen por reveni en 1996 al Homburg, kie la sukceso konfirmiĝas jaron post jaro.

Oni ankaŭ rimarkas pli kaj pli junajn spektantojn, kio estas grava evoluo koncerne la pluvivadon de la «Platt», plej grava ero de la loka kulturo.

Kiel simple krei surtekstaron por filmo...

PREPARAJ LABOROJ

Filmoj povas prezenti sin sub diversaj formatoj, plej ofte «AVI» aŭ DVD (mpeg). Se vi ne jam havas AVI-version de la filmo, sed vi havas DVD-on (akiritan aŭ mem faritan okaze de TV-elsendo per salona kopiilo), vi povas krei AVI-version per softvaro kiel (ekzemple) **Fair Use Wizard**.

Mi ne detale klarigu la uzmanieron de tiu programo, sed prefere vi elektu la rekomenditajn opciojn, kaj elektu taŭgan grandecon por la AVI-dosiero, por ke ĝi sidu sur 1 KD, (650 MB ekzemple). Sciu ankaŭ ke tiu laboro, por via komputilo, povas esti tre longa (ĝis pluraj horoj)... sed ĝi povas nokte labori por vi !

Alia softvaro povas ankaŭ elpreni la (apartajn) subtekstojn de la DVD, ekzemple **SubRip**, por ke vi havu komencan dosieron kun komenc- kaj fin-tempoj de ĉiu subteksto. Mi ne klarigu ĝian uzon ĉar vi plejofte ne bezonos ĝin : rete troveblas surtekstoj por preskaŭ ĉiu filmo... sed ĝenerale ne en esperanto. Pro tio, vi devos traduki la trovitajn surtekstojn. Ofte ankaŭ vi devos iomete korekti ilin (ekzemple ĉar la indikitaj tempoj ne taŭgas).

SUBTITLE WORKSHOP

La plej bona softvaro por krei novajn surtekstarojn, traduki aŭ korekti jam ekzistantajn, estas **subtitle workshop**, kiu krome estas nepagenda (dum aliaj, profesiaj, similaj softvaroj kostas centojn aŭ milojn da eŭroj !).

Ekzistas multegaj formatoj de surtekstaj dosieroj. Mi rekomendas ".SRT" (mi scias ke multaj softvaroj povas trakti ĝin).



La filmo «*La edzino de Ghilo*» en **Subtitle Workshop**.

Teknika problemo estas ke **Subtitle Workshop** ne traktas **Unikodon**, do vi redaktu Esperanton per h-sistemo, kaj poste (eventuale – ĉar mi ne konsilas tion pro antaŭvideblaj problemoj) uzu alian programon por traduki tiun tekstan dosieron de h-sistemo al Unikodo kun veraj ĉapelitaj literoj. Atentu ke vi savu la Unikodan version en formato UTF-8, kun BOM-bajtoj (necesa por multaj softvaroj).

Intuiciaj mendoj kaj facila aliro al la menuoj, kun rimarkindaj rapido kaj stabilo, draste reduktas la necesan labor-timpon. Eĉ infanoj kapablas uzi la softvaron. La ĉeesto de la filmo en ekrana fenestro estas unu el la specifajoj de **Subtitle Workshop**. Post tre malmulte da tempo kiu ajn kapablas ĝin efike uzi.

Pere de ĝi, mi jam surtekstigis pli ol 20 filmoj, inter kiuj, antaŭ nelonge, «*La edzino de Ghilo*», elŝutebla tra nia ttt-ejo (foto).

POSTAJ LABOROJ

La finitan laboron vi plurfoje kontrolu (ĉu ĉiuj surtekstoj aperas je la bona momento kaj sufiĉe longe, ĉu neniu el ili preterpasas la limojn de la ekrano, ĉu ne restas lingvaj eraroj,... ?).

Multaj modernaj salonlegiloj kapablas samtempe legi kaj montri filmon (en formato .AVI) kaj surtekstojn (en formato .SRT) kondiĉe ke ili estu gravuritaj kune sur la sama KD, sub la sama nomo (ekzemple Ghilo.avi kaj Ghilo.srt). Vi tiucele uzu vian kutiman softvaron (**CDBurner**, **Nero**,...).

DVD-Flick eĉ povas krei veran DVD-on per viaj dosieroj .AVI kaj .SRT (ankaŭ tiu-ĉi estas nepagenda kaj tre facila).

Mi eble praktike montros ĉion-tion en Mozet (se ne, aliloke...).

J-M.J

<p>Verviersa Angulo Verviersa Espéranto Grupo</p>	<h1 style="text-align: center;">CRISE : l'Espéranto, solution ou utopie ?</h1>	
<p>Comité de V.E.G.: Président: J. Jacob 19 Chemin de la Rostibouhaye 4910 POLLEUR (THEUX) Tél. 087/22.10.79</p> <p>Trésorier: D. Lousberg 25 Rue Pierre Fluche 4800 VERVIERS Tél. 087/ 087/222030</p> <p>Secrétaire: J.M. Jacques 5 Rue Joseph Wauters 4800 VERVIERS Tél. 087/33.02.92</p> <p>V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.) M. Delforge 16 Rue des Glacières 6001 MARCINELLE</p> <hr/> <p>Cotisations Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année l'une des cotisations suivantes au compte 979-5327148-10 IBAN : BE41 9795 3271 4810 BIC : ARSPBE22 (banque : Argenta)</p> <p>de Senlime, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.</p> <p><i>La cotisation de Senlime est de nouveau obligatoire et fixée à 10 EUR (l'abonnement à ce bulletin en version «papier» s'élève à 12 € en raison de l'augmentation des coûts).</i></p> <p>D'avance, merci à tous !</p> <p>A.P.E. 2011 (EGV) 14 € U.E.A. 2011 (MA-T) 61 € Senlime (cotisation 2011) 10 €</p> <p>en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année «cotisation de pour ..».</p>	<p>Nous détenons en Belgique le record du monde de la plus longue période sans gouvernement. En cause : le «conflit» flamands-wallons, ou l'extrême droite séparatiste, ou... allez savoir !</p> <p>Vieil espérantiste, j'ai souvent eu l'occasion d'entendre un journaliste demander à l'un de mes collègues et amis s'il pensait que l'espéranto pourrait être la solution à notre problème linguistique belge. La réponse, du style «bien évidemment non», m'a toujours quelque peu «énervé».</p> <p>Lancé en 1998, le slogan «Tous bilingues en l'an 2000» apparaît aujourd'hui comme un discours creux qui n'a rien changé sur le terrain. On a considéré un peu vite le problème comme réglé... et l'espéranto comme une utopie. On ne s'est pas suffisamment posé la question de la motivation des élèves et du plaisir d'apprendre une langue. Or, pourquoi apprendre le néerlandais alors que l'anglais... Et quand des jeunes ont été placés, dans le cadre d'un «éveil aux langues par la chanson» en primaire, face à une quinzaine de langues dont l'espéranto, ils en ont remarqué les qualités et se sont déclarés prêts à l'apprendre, parce que c'est la plus amusante...</p> <p>Qu'en déduire sinon que le bilinguisme, comme sa version améliorée, le «multilinguisme», sont les utopies, et non l'espéranto, que nous pourrions généraliser en Belgique en quelques années (sinon mois !).</p>	<p>J'ai participé en 1998 au Congrès de l'Association Universelle d'Espéranto à Montpellier : 3133 participants, dont certains venus de pays en conflit (israéliens et palestiniens, par exemple) et pas le moindre incident à signaler (et il faut avoir vu des milliers de personnes originaires de pays et langues différentes se parler pendant des jours sans un seul traducteur) !</p> <p>Nous, espérantistes, pouvons revendiquer le titre de «citoyens du monde». Il existe d'ailleurs une association dénommée «Cité Espérantienne» qui regroupe les espérantistes qui le désirent autour d'une charte constitutionnelle similaire à celle d'un état sans territoire...</p> <p>C'est cette constitution qui a été adoptée, quasiment point par point, par la nouvelle république du Cabinda, qui vient de proclamer unilatéralement son indépendance le 4 février 2011. Ainsi notre modèle organisation- nel a fait école dans le domaine politique, prouvant la compé- tence des espérantistes en la matière.</p> <p>Pourquoi, dès lors, demanderez- vous, les espérantistes ne présentent-ils pas de candidats aux élections belges, comme ils l'ont fait en France et en Allemagne par exemple ? C'est que le code électoral belge présente des conditions particulièrement «dures» pour le dépôt de nouvelles listes, imposées par le passé pour contrecarrer... l'extrême droite ! Et où sont passés les candidats et les votes de l'extrême droite ?</p>